

AVANCO

31/5/95
1-95

oficiala organo de kuba esperanto-asocio

Ennavo

SAEST'95

Sukcesa evento sciencoteknika 3

Alexis Otero Castellón

Kultura panoramo

El katakomba flustro kaj venĝa historio 5

Maritza Gutiérrez González

Kriterioj

Kial homoj kabeigas? 8

Juan Lázaro Besada Toledo

Jen, nia historio

1904-1909: kvin tiklaj jaroj 10

Juan Ramón Rodríguez Gómez

Pri movado senhalta

Camagüey: Prioritat-fonto 13

Maritza Gutiérrez González

KEA jam kvar foje en EXPOLINGUA 13

Martín Castro López

Pedagogio'95: Digna reprezentigo 14

Iom for de la ĉefurbo 14


Antaŭen! 15

Dua bulteno de la 2a Nacia Kongreso 16

Estimataj

Diversaj lastminutaj taskoj, kiaj la evento SAEST'95, prokrastis la aperigon de via tribuno. Tamen, kontraŭ ĉiuj baroj kaj limigoj, jen ĝi por bildigi la agadon asocian dum la unuaj monatoj de 1995. Ciel, pensu ke, malgraŭ ĉio, la redakto-stabo laboras ĝis pli ol noktomezo por ke vi havu ligilon varian kaj enhave riĉan. Se via legado estas ĝuoplena, kion ni ja alcelas, eble vi pretas pardoni la prokraston. Sanon kaj ĉion bonan deziras, via redaktoro:

Alexis



Kuba
Esperanto-
Asocio

Nacia Estraro

- *Julían Hernández Angulo
Prezidanto. Atentas pri plenumo de la ĉefaj taskoj asociaj kaj tiuj de la opaj fakoj.
 - *Maritza Gutiérrez González
Generala sekretario. Kontrolas la internan agadon de la tuta estraro.
 - *Alberto Gabriel Rodríguez Pineda
Financoj. Flegas administradon en la Nacia Sidejo.
 - *Héctor Jiménez Batista
Instruado. Atentas ILEÍ-sekcion.
 - *Alexis Otero Castellón
Informado. Ĉefredaktoras en Avanco kaj Noktuo.
 - *Juan Ramón Rodríguez Gómez
Internaciaj k. Publikaj Rilatoj. Okupigas pri historio kaj libro-servo.
 - *Martín Castro López
Kulturo. Prizorgas klerigajn aranĝojn.
- komisiitoj
- *Pedro Fernández Rodríguez
Perkorrespondanta Kurso.
 - *Roberto Torres Álvarez
Membrekontrolado. Zorgas pri scienco kaj tekniko.

havano, la 31-an de majo 1995/n-ro 1.95/aperas tri foje jare/
eldonas kuba esperanto-asocio/pf.: 5120; 10500 havano, kubo/
telef.: 40-1364 k. 40-4484. fakso: 53 (7) 338729/ĉefredaktoro:
Alexis otero castellón/grafika aranĝo k. kunredakto: juan ra-
món rodríguez/kunlaboris: juan l. besada, maritza gutiérrez,
martín castro, julián hernández, héctor jiménez, roberto moli-
na, alberto rodríguez/prezo po ekz.: 1.00 cup (enl), 2.00 nlg
aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al kea-konto de uea: keaux-u/
subskribitaj artikoloj esprimas la opinion de ties aŭtoroj/
ĉiuj rajtoj rezervitaj/reproduktado permesata. (bv. indiki la
fonton kaj sendu du ekzemplerojn al la redakcio.)

SAEST '95

Sukcesa evento



scienceteknika

Aloxis Otero

La multaj limigoj, baroj kaj malhelpoj fine ne fiaskigis la kunsidon de la esperantistoj scienculoj arigantaj en la kadro de la Asocio. La evento okazis en la muzeo pri sciencoj Carlos J. Finlay, en tiu ĉi ĉefurbo, la 19-an kaj 20-an de majo. En la konsiderata plej grava KEA-arango de la jaro prezentigis are da prelegoj el diversaj aŭtoroj.

La renkontiĝo estis saĝe aranĝita en kvar diversaj laborkomisionoj (Aplikado de Esperanto en ĉiaj scienceteknikaj branĉoj; Temoj rilataj al la instruado de la lingvo; Utiligo de Esperanto en la sansistema tereno; Spertoj en la lernado de la lingvo inter gepatroj kaj gefiloj), po du en ĉiu el la imponaj salonoj Parainfo kaj Treller de la supre menciita muzeo.

Speciale meritas storman aplaudon S-ro. Roberto Torres kaj sian ageman edzinon D-rino. Carmen Aleida Hernandez, ĉefaj inspirintoj kaj impulsintoj de la ideo kaj preparlaboroj. Ili sukcesplene stiris la ŝipon kaj montris veran organizitemon.

Dum la evento oni aranĝis viziton tra la muzeo kun esperanta ĉiĉerono. Tiun rolon ludis S-ro. Miguel Angel González, kiu sufiĉe lertis en l' afer' ĉar li engaĝiĝis nur semajnon antaŭ la okazigo.

Indas je kroma mencio la helpemon de la laboristoj de la muzeo. SAEST '95 plenumis ĉiujn atendojn kaj celojn de la organizantoj kaj montris ke ankaŭ en scienco kaj tekniko ni laboras avangarde.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

Kiel elmontro pri kiom ampleksa estis SAEST '95, ni sekve ni prezentas liston de la prelegoj:

- Alonso, Martha
"La ludoj en la instruado"
- Alvarez, Didio
"Martí kaj la sciencoj"

SCIENCO KAJ TEKNIKO

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Barreras, Santiago
"Kvalita studado pri du serologiaj metodoj kun antigenoj de zacia produkta"
- Benavides, Mercedes
"Ftizo en Kubo"
- Briel, Francisco
"Lingva instruado de"

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Esperanto en Orienta Havano"
- Cabrera, Gilsa
"Laboro pri la Domo de Orientigo al la Virino kaj Familio en Malnova Havano"
"Raporto pri Homeopatia kuracado"
- Castro, Martín
"Instruado kaj kulturo: postuloj de nia instruistaro"
- Díaz, Tomás
"Konduto de la kontraŭstaro al diversaj patogenoj en specioj de kubdevenaj tomatoj"
- Dominguez, Alberto
"Lokigo de gasonaftaj putoj pere de la esplorado kaj de bitumaj horizontoj"
- Fernández, Pedro
"Kiel instrui Esperanton meze de la speciala periodo"
- Ferrer, Juan A.
"Taksado de malsimilaj terapèutikaj metodoj celante la kuracadon de la Diare Sindromo de la bovidoj"
- Fumero, Alberto
"Problemoj de la maŝintradukado de tekstoj hispanlingvaj"
- Gutiérrez, Maritza
"Esperanto kiel radiofonia komunikilo"
"Martí en la socia komunikado"
- Hernández, Julián
"Generala rigardo al la familio de hindo-eŭropaj lingvoj kaj ties rilatoj kun Esperanto"
"Kiel pensigi la lernantojn esperante"
- Jiménez, Héctor
"Denaska dulingveco. Kelkaj internaciaj praktikaj konsideroj kaj personaj travivaĵoj"
- Meneses, Olga Lidia
"Metologio kaj rimedoj por krei distran komputilmetiejon de Esperanto"
- Montes de Oca, José Luis
"Influo en laboraj akcidentoj de bieraj fabrikoj pro malbona kvalito de la boteloj"
- Núñez, Mayra
"Atento al geinfanoj de bazaj lernejoj per E-o kiel irejo por lingvistika orientigo"
- Otero, Alexis
"Eta mankalkulilo PAC"
- Ramos, Cirilo
"Pri la instruprogramoj de Esperanto por la kubaj infanoj"
- Rodríguez, Juan R.
"Sciencteknika informado por ĉiuj (en- kaj eksterlande)"
- Suárez, Rita M.
"Graveco de la uzo de aŭda protezo en la plej junaj surdaj infanoj kaj premsignado de spuroj per Filadelfo al surdaj infanoj"
- Taboada, Bárbara
"Studado de du zonoj kun malsama grado de malpurigo"
"Testo de reakcio mensa TREMEN (sofvaro)"
- Torres, Roberto
"Historio kaj evoluo de E. en scienco kaj tekniko"
"La mondo de sukerfabriko"
- Vega, Margarita
"Scienco kaj teknologio, irejo larĝa sed malpropra"

Dum februaro la provinca filio de la ĉefurbo lanĉis konkurson cele al verkado de noveloj. Tiel, ili flegis la kulturen flankon de la agado en la kadro de la Asocio. La konkurson partoprenis naŭ verkoj, el ĝi ignorata kvanto de aŭtoroj kaj la rezulton pritaksis trikapaj jurio kiun konsistigis samideanoj Juan Ramón Rodríguez, Juan Lázaro Besada kaj kiu redaktas ĉi alineojn. Post detala analizo de la opaj verkoj oni konkludis ke la plej kvalita novelo, el ĉiuj vidpunktoj, estis tiu sendita de Maritza Gutiérrez. La nomo ni ne sciis ĝis diskonigi la rezultojn ĉar la partoprenintoj uzis pseŭdonimojn. Unu el la eroj de la premio konsistis en publikigo de la verko en *Avanco*. Jen ni reproduktas ĝin plene, kaj ankaŭ por ke vi ĝu la magion kiun elverŝas la aŭtorino skribil-en-mane.

La redaktoro

El katakombo flustro kaj venĝa historio Maritza Gutiérrez

Januare de 1995, dum la Komitata Laborkunsido en la orienta provinco Camagüey, antaŭe Porto Princo, grupo de samideanoj kaj mi decidis ekskursi tra urbo. Tiel ni alvenis samtempe al la preĝejo-konvento La Merced en la urbocentro kaj hazarde ni sciis pri katakomboj, kies sekreto ni esploris evidente. El tia travivaĵo naskiĝis ĉi noveleto.

la aŭtorino

Havano, la 16-an de februaro 1995

I

Entuziasme kaj avidoplene ni alvenis al granda preĝejo en la homsvarma urbocentro. Ĉe flanko pordo pendas anonco pri katakomboj. Unuanime, ĉiuj grupanoj decidis eniri tien. Post kelkaj demandoj unu el la samideanoj kondukis nin traporde kaj tie maljuna virino nin bonvenigis afable. "Vi estas ĉe preĝejo La Merced, kiu samtempe apudhavas konventon". Sekvante ŝin la grupo aŭdis eksplikojn pri la freskoj kaj statuoj de la preĝejo. Kelkajn minutojn poste ni rimarkis la ekziston de subtera ĉambro sube de la ĉefaltaro. La ĉiĉeronino enkonduke klarigis pri hazarda malkaŝo de antikva urba tombejo, kiun masonisto eltrovis dum riparlaboroj ĉe jarojn antaŭe. La grupo trapasis la feran pordon kaj zorgeme enpaŝis en humidan malaltan ĉambron kies muroj, el ruĝaj brikoj, atestas pri jarcentoj.

Ene de kriptofrida, ni observis diversajn skatolojn vitrajn elmontrantaj objektojn malnovajn, pendarojn, kulerojn, lavujon argilan kaj eĉ, laborilojn de ĉarpentistoj. Aliloke, rektangula ŝtono je 70 centimetroj longa, 50 larĝa kaj 5 dika atestas pri entombigo de kamagveja virino. Per hispanlingva arkaika kaligrafio legeblas: "Ĉi tie kuŝas Sinjorino Tereza de Miranda kaj Agramonte kaj ĝi estas sidejo kaj sepulitejo de 1^a intendanto pedelo Majoro Sinjoro Francisko Recio kaj Agramonte kaj ties elstaraj postuloj. Februaro 1777".

En alia angulo de la kriptoj nin miris bone konservitaj restaĵoj de virino indiandevema kun kalkmonata bebo samtombe kaj en ĉerkoj preskaŭ ne domagitaj de l' tempopaso. Laŭ asertis la ĉiferonino, la anonima virino tie kuŝanta estis mulata indianino eventuale envolvita de mistera haloo, kies morton oni supozas kaŭzis stranga epidemio.

II

Tiumatene Maria Inés estis vekita de intermita koŝmaro kiu jam dum semajnoj ripetigis. Varmo tro ĝenas ŝin. Tre apude ŝia kalkmonata bebo dormas en mola lulilo de ŝi mem konstruita. Kiel ĉiumatene la virino iras rekte ĝis la kuirforno, fajrumas ĝin kaj ekpreparas kafon. Ŝi ĝuas la privilegion posedi propran ĉambreton ege humilan, kie karbona forno uzblas por urĝaj bezonoj. La ĉambro de Maria Inés estas apud la domo de gesinjoroj Agramonte. "Hodiaŭ mi iros ĝis la merkato" pensas ŝi dum moviĝas tre lante. Kvazaŭ flustra frapo ĉeporda aŭdiĝas. Ŝi ignoras la pordofrapon kaj rigardas la bebon dormanta. Ripetiĝis flustre la frapo. Ŝi iras ĝis la pordo kaj atendas momenton. Iel ordigante ŝian robon apertas la pordon lomete. Viro alta, blanka kaj fortika kun grizeca barbo puŝis la virinon milde kaj enŝoviĝis en la ĉambreton. "Sinjoro, vi tro malprudentas" rideme ŝi riproĉas. Sinjoro Francisko, dommaŝtro de la bieno, ridas senzorge kaj kisas la belan mulatinon kies stranga rasmiksaĵo kaj silka hararo de antaŭ multaj jaroj trenas lin en amorekzalton.

Sinjoro Francisko Recio kaj Agramonte estas tre respektata en la urbo Sankta Maria de l' Porto Princo pro ties nobela origino. Lia patro estis hispano alveninta en Kubo komence de la XVIII-a jarcento. Dum tiu tempo la prestiĝo kaj riĉaĵoj de la familio multe kreskis. La unua filo Francisko edziĝis kun sinjorino Tereza de Miranda, unika filino de nobela familio de Porto Princo. Multaj jaroj pasis jam de tiu vigla epoko.

Nun la viraj brakoj ĉirkaŭas junan indianin-mulatinon, sola posteulino de pura indianino vivanta en la domo, kiu kuniĝis kun hispana onklo de sinjoro Francisko. El tiu raso miksaĵo devenas la bela Maria Inés. Ŝi elkateniĝas gracia de l' viro kaj proksimiĝas al la bebo. "Sinjoro, li ploras kaj jam tre baldaŭ la negrino Carmita venos lin varti". Li ŝialentas dum kelkaj sekundoj. "Nu, je la 2-a posttagmeze mi vizitos vin kaj vi ne povos min primoki". Sed ŝi rapide moviĝas dum per fingra signalo rifuzas la proponon. "Memoru ke sinjorino Tereza bezonas kelkajn varojn kaj mi iros al la merkato". Li kuntiras la brovojn ĉagrenita. Ŝi ridas mokeme. "Diablulino, tiel ne eblas!". Per rapida okulumo li rimarkas pri la bebo kiu maltrankviligas. "Li malsatas" ŝi prenas la bebon surbrake kaj proksimiĝas lin al sia mamo. La bebo tuj eksuĉas avide. "Nu, virin' mia, iru al la merkato kaj venontsemajne ni renkontiĝos. Mi estos ĉe la sukerfabrikoj". Foririnte la viro, Maria Inés indiferente rigardas sian bebon dormi.

En sia ĉambro, kiel kutime sinjorino Tereza suferas tusatakon. Ftizo konsumas ŝin de antaŭ multaj jaroj. Fronte al la spegulo ŝi ekmemoras pri pasintaj tempoj kaj ŝian koron invadas malsana kolero. De antaŭ tri jaroj ŝi eksciis pri la sekreta kunigo de la edzo kun la indianin-mulatinino Maria Inés. Ekde tiam ŝi atendas la okazon sin venĝi pro la perfido de l' amantoj. Tamen, ŝi sukcesas kaŝi tiujn sentojn. Sed de tempo al tempo

mensaj deliroj forigas sin de l' mondaj regionoj. La lastan nokton akompanis sin frenezaj inkubsonĝoj. Guste tagon antaŭe ŝi eksciis per sklava flustro, ke la filo de Maria Inés estas la posteulo de sinjoro Francisko kaj ke li donos la familian nomon al la infano post la kvina aĝo.

Kontraste, ŝi matene estas strange trankvila. Kelkajn horojn poste la edzo estas for dum tuta semajno. Ŝia animo spiros pli libere. "Dio kuragigu min aŭ mi ne plu eltenos" malespera penso trairas la virinan kapon.

Post la dua horo posttagmeze, sinjorino Tereza akompanite de juna negrino milde puŝas la pordon de l' eta ĉambro kie vivas Maria Inés. Intenye ŝi renkontas la negrino Carmita kiu surprizite rigardas la virinon gape. Decideme la virino alproksimiĝas rigardante la infanon kun vema sento sur vizaĝo. Poste ŝi rigardas ĉirkaŭen kaj prenante la junan negrino per la brako ambaŭ eliras tre rapide de la ĉambro.

Denove en sia ĉambro soleco sinjorino Tereza leonine moviĝas ege kolera. Dum la tuta tago ŝi ne plu eliris de la ĉambro. La edzo foriris al la sukerfabrikoj. Intertempe ili ne renkontiĝis.

Tiuvespere Maria Inés multe surprizigis sciante pri la vizito de la dommastrino. Tamen, ŝi ne plu memoris la incidenton. Dum la tri sekvaj tagoj la domo estis ege trankvila.

Post banaĝo en la rivero, Maria Inés iris tagmanĝi en la doman kuirejon, kie kutime ŝi sidigas kun la tri maljunaj kuiristinoj kaj kunmangas ĉiutage. Rimarkinte dolĉaĵan porcion en sia argila telero ŝi kuriozemis. "Sinjorino Tereza denove preparis prunan dolĉaĵon kaj gardis apartan porcion por vi". La virino ridas ĝoje kaj ekmanĝas ĝin. "Ne zorgu, ĉar ni manĝis la nian". La konversacio daŭris ankoraŭ duonhoron. La vetero estas humide tro varma kaj ŝi piediras lante ĝis la ĉambreto. La negrino Carmita atendis sin ĉeporde kun la infano surbrake. "Li malsatas denove". Ŝi prenas la bebon kaj kisas lin. Dum la negrino preparas kafon, ŝi suĉigas la infanon.

Tiunokte ŝi suferis konstantan stomakan pezecon. Dormo mankis. La bebo multe ploris.

La du sekvajn tagojn la virino ne fartis bone. Stomakdoloro daŭre ĝenas sin. La negrino Carmita preparis diversajn infuzajojn vane. Tiuvespere Carmita, la negrino, maltrankviligis pro la konstanta plorado de la infano. "Mi parolos kun la kuracisto de la sinjoro". La tago kvazaŭ mortas. "Mi antaŭsciis ke nenio savos min" diras la virino tragike dum la negrino esploras. "Jee, tiu frenezulino venenigis min, mi estas certa pri tio" kvazaŭ kun rida mieno ŝi rigardas sin en la difektita speguleto pendanta sur la muro ligna.

Tiunokte Maria Inés forte premis la bebon surbrake kaj susuris lulkanton ege tristan. La infano ploras intermite. La negrino Carmita kuŝas surplanke en aparta angulo. Pasas la horoj kaj ĉiuj endormiĝas.

Sekvamatene, la tago kiam revenos sinjoro Francisko, la negrino vekiga kaj rapide proksimiĝas al la lito kie Maria Inés kvazaŭ profunde dormas kun dolorgrimaco surlipa. La negrino tuŝis la bebon, kies rigideco terurigis la sklavinon.

Monaton poste, tre mistere forpasis sinjorino Tereza. Unu semajnon poste, la sinjoro Francisko forlasis la domon tre silente. Dum multaj jaroj li vivis en la sukerfabrikoj kaj eĉ ne vizitis sian malnovan domon en Porto Princo.

*Polemiki estas afero tute libervola, kaj ne pro tio Avanco
prisilentos kontribuadojn, kies argumentoj iel kontraŭas
tiuajn de la redakcio. Tial ni publikigas la ĉi suban, kio
absolute ne signifas ke la redakto-stabo samopinias aŭ
apogas ion pri la esprimataj elcerbumaĵoj. Ciel, oni
montras sufiĉan toleremon kaj atendas taŭgajn reagojn...
silento, simple pravigas la vidpunkton de la aŭtoro.*

La redaktoro

Kial homoj kabeigās?

Juan Lázaro Besada

Plurfoje esperantistoj aŭdas la demandon pri la kvanto da parolantoj kiuj apartenas al niaj vicoj. La respondo al tiu demando estas iomete malfacila, des pli ke ekzistas tiu malbenita aro da eternaj komencantoj, kiuj neniam superas la lingvan infanaĝon, kvankam nek amo al la lingvo, nek deziroj ĝin paroli mankas al ili. Tamen, multe pli malfacile respondebla estas la jena demando, kiun ni preskaŭ neniam frontas, kvankam ties graveco meritas seriozan konsideron: kiom da homoj post eklerno aŭ posedo de Esperanto foriras el niaj vicoj? Kaj plej grave: kial ili faras tion?

Se ni kutimas distrumpeti la avantaĝojn kiujn por senpera, vere homa kaj senbara komunikado donas nia lingvo - kaj ni scias, malgraŭ ĉiaspecaj anatemoj kaj antaŭjuĝoj, ke ni pravas - kial ni ne analizas la faktojn kiuj influas en tiu kabeigo?

Antaŭ ĉio mi substreku, ke la hodiaŭa vivo estas plena de malfacilaĵoj. Tio estas nekontestebla vero, sed ankaŭ estas vero, ke plurfoje nia strategio estas saĝe elpensita, sed tre malbone kaj mise realigata.

Ke Esperanto estas ĉefe kultura lingvo, ne estas sekreto por iu ajn. Tamen, foje por ne diri sufiĉe ofte, ni mem forgesas tion. Almenaŭ en nia lando - kaj tio estas kialo por ke ni fieru - la movado estas ĉefe juna. La plimulto de nia membraro apartenas al tiu feliĉa, impulsoplena vivetapo. Sed - kaj mi ne rezistas la tenton fari ĉi tiun demandon - ĉu ni kapables trafte proponi al ili, vastan, atentokaptan, interesovekan gamon da eblecoj utiligi la lingvon kiu restigos ilin inter niaj vicoj? Jam Kuba Esperanto-Asocio estas dekkvin jara. Sed bedaŭrinde - kaj mi emfazas la vorton bedaŭrinde - ankoraŭ ni ne sukcesis krei teatrogrupon, nek beletroamantan rondon, nek grupon da fakuloj - escepte areton da medicinistoj - interesigantaj apliki la lingvon fakte.

Niaj diplomitoj - tiuj kiuj restas inter ni - ĉeestas la asociajn aranĝojn por danci, manĝeti, trinki kaj babiladi, nekredeble... hispanlingve! Ne aperas talentaj organizantoj kapablaj vigligi la kulturan agadon. Ekzistas tre lertaj,

elstaraj ni diru, lingvaj kompetentuloj, sed ili laboras izolitaj ni ne scias kial.

Se ni trovus la formon ampleksi nian agadon sur la kultura tereno, se ni estus kapablaj forgi en niaj lernejoj, ne nur parolantojn de Esperanto, sed ankaŭ ni forigus homojn konsciajn pri la valoroj de la lingvo kaj ties eblecoj, se ni iel pretigus kursojn por pli funda studado de la E-kulturo, ni certe altirus la atenton de pluraj homoj kiuj aŭ ne kabeigus, aŭ tuj revenus en nian asocion:

Lastatempe mi parolis kun pluraj jusbakitaj esperantistoj, kiuj bonege regas la lingvon kaj sopiras al plej diversaj kulturaj agadoj. Ĉu vere malfacilas helpi ilin, kio fine signifus samtempe ankaŭ helpi nin? Se ni pretigus superajn kursojn, en kiuj la interesigantoj povus pli funde konatigi kun niaj kulturo, kaj historio per aŭskultado de kasedoj, laŭtlegado kaj analizo de diversaj verkoj kaj enprofundigado en nian movadon, mi certas, ke oni povus eviti -aŭ almenaŭ minimumigi- la kabeigon inter niaj vicoj, tiel plialtigante la jam prestiĝan asocion al kiu ni apartenas kaj kies plua evoluo estas ĉiesa tasko.

Se ne eblas, pro la sufiĉe konataj malfacilaĵoj kiujn ni havas, krei tiaspecajn kursojn, almenaŭ eblas estigi rondojn sub la gvido de kompetentaj talentuloj, kiuj al nia movado certe ne mankas. Materiajn rimedojn ni havas. La biblioteko de KEA kaj ties enhavo de valoregaj libroj, kasedoj, revukolektoj kaj aliaj eldonaĵoj donas al ni enormajn ŝancojn entrepreni tian laboron. Ne temas nur pri la nuno, ni ankaŭ devas ame flegi la estontecon. Ju pli kapablajn, kreopovajn kaj klerajn esperantistojn ni forigos, des pli respektindan kaj dignan asocion ni havos.

Jen instigo al nia kolegaro por funda debato pri tiu problemo. Ĉar ĝi certe tuŝas nin ĉiujn. Kaj se venas proponoj por tuj organizado, ek la laboro kaj des pli bone!

Mi invitas la interesigantojn al reago. Ĝi certe pliriĝos nin!

Je la redakto-fino, kiam ni reviziis, alvenis la unua reago flanke de Julián Hernández Angulo, Prezidanto de Kuba Esperanto-Asocio. Eliru vi mem la proprajn konkludojn... kaj kiel dirite, jam la trian fojon, ne hezitu reagi.

La redaktoro

*Ĉu kiu ajn esperantisto kabeigas?

NE, nur tiuj, kiuj post talenta kaj aktiva laboro, pro ajna miskompreno, notiriĝas ne rimarkante la plej superan celon.

*Ĉu ĉiuj kiuj alproksimiĝas al la movado fariĝas esperantistoj?

NE, nur tuj, kiuj lernas la lingvon, konatigas kun ties historia kaj kultura fono, interpretas la internan ideon kaj iel laboras por disvastigi la lingvon sen preteratenti ĝian utiligon.

*Ĉu eviti KIEL-VI-FORTULOJN?

TUTE NE, ili ankaŭ helpas la movadon kaj disvastigas la lingvon. La fakto ke ili amas kaj sentas la internan ideon de nialingvo, ja iel valoras.

La redaktoro

Ne facilas skribi pri nia historio, kiam oni scias ke la kuba Esperanto-movado ekdisvolviĝas kiamre de ni jarcento. De longe, kelkaj esperantistoj laboras en tiu direkto kaj, kvankam ne konstante, almenaŭ regulaj oni esploras, sendas, trovas, konservas, valoras, ... por havi iun tagon pli precizan historion de la esperanto-movado ĉi tie. Ĉi tie, nur ni alproksimiĝas vin al tiel grava celo.

Komprenable, ne estas definitiva aŭ konkluda laboro; sed la ĝenerala panoramo aŭ skeleto de tiu historio, al kiu, iam post iam, oni aldonas kontojn da elementoj, detaloj, konsideroj, precizigoj, ktp., kun la koncernaj dokumentoj, fotoj, ... Ankoraŭ mankas longa voja. Niaj esploroj daŭrigas.

Evidente, ĉio dirota de ni ĉi tie estas rezulto de la laboro kaj kunlaboro de kelkaj personoj. Nome de la Komisiono pri Historio, mi deziras danki, ĉefe la grandan helpon de la malnovaj esperantistoj Raúl Juárez Sedeño (Camagüey), kaj Pedro Pablo Lamas Díaz (Ciudad de Avila), kaj ĉiuj multe alportis, kaj alportas kun dokumentoj, informoj, sugestoj, ...

Ni esperas ke tiu ĉi avantaĝo servu al nia esperantistaro por kuni diversajn elementojn ne konitajn de multaj; kaj, krome, servu al ĉiuj kiel stimolon por esplori kaj skribi la lokajn historiojn. Ĝendube, ĉiuj povas alporti novajn kaj ne imagiblaĵajn elementojn pri la historio de la Esperanto-movado en Kubo.

Tiuj lokaj rakontoj permesus ricegi nian konon pri la laboro dum pli ol 90 jaroj de historio tra malsimilaj epokoj el diversaj vidpunktoj kun malsimileco ankoraŭ inter iuj momentoj kaj aliaj en la lando.

Tiel estas la malsimileco ke, celante bonan organizon de ĉiu momento kaj etapo, kaj la sukcesan legadon de ĝi entute, ni konsideras ke la pli ĝusta maniero estas dividi tiun longan laboron en ok periodoj, tiamaniere: 1904-1918, 1919-1930, 1931-1947, 1948-1957, 1958-1973, 1974-1979, 1979-1990, kaj 1991 ĝis nun, kun internaj subdividoj.

El la unua periodo... (I)

1904-1909: kvin tiktaj jaroj

La jaro 1904 estas starpunkto por la propagando favora al Esperanto en Kubo. (1) En aprilo, aperas la artikolo "El Esperanto", en la revuo *Escritura veloz*, organo de la kubaj stenografoj. (2) Tie, oni rimarkas la facilecon de la lingvo kaj la profitojn kiujn oni povas akiri pere de ĝia lernado. Jam en antaŭa numero (ne trovita de ni ankoraŭ), malgranda artikolo informis pri novaj provoj de internacia lingvo, menciinte Esperanton kaj Volapukon. (3) En la sama jaro, la pastro Ricardo Vicente (hispana

instruisto ĵusalveninta al Camagüey), faras intensan propagandon. Oni scias ankaŭ ke la 20an de novembro, per letero, li mendis al Hispanio ses ekzemplerojn de Esperanto-vortaro farita de Antonio Guinart. La 15an de februaro, 1905, Ricardo Vicente ricevas poŝtkarton subskribitan de R. Codorniu (ekde Murcia), kiu raportas pri la sendado de la libroj. (4) Pro la efiko de lia laboro, la pastro Vicente ricevas ankaŭ la jenan rekonon de la Hispana Societo por Propagando de Esperanto, pere de Honora Kartio:

La Direkta Komitato de H.S.P.P.E., taksinte la laboradon por disvastigo de Esperanto de Sinjoro R. P. Ricardo Vicente, kaj dezirante liveri al li publikan ateston de sia dankemo, decidis nomi lin Disvastiganta Membro de nia Societo, kaj por tion certigi mi subskribas tian ĉi karton en Valencio, la 1an de junio 1905. La sekretario: Antonio Guinart. (5)

Post 1904, ni kuragas datigi la ekziston de la unuaj esperantistoj en Kubo, kiuj lernis la lingvon memstare kaj, kvankam izolitaj, sukcese fondis malgrandajn klubojn. Tiaj estas la kazoj de tri esperantistoj, kiujn oni konsideras pioniroj de nia movado. Ili estas: la jam menciita Ricardo Vicente, la D-ro. Rafael Crespo Rangel (Báez, Santa Clara), kaj la D-ro. Eduardo Francisco Rodríguez (Sagua la Grande). Tre gravan rolon en la diskonigo de Esperanto nialande ludis D-ro. Fernando Ortiz, elstara intelektulo tutmonde konata pro siaj studoj rilataj al sociologio, etnologio, juro, folkloro, ... En marto 1906, sub la titolo "El lenguaje universal" kaj per la pseŭdonimo D-ro Noveno (kie per si mem donas ian scipovon de la lingvo), Ortiz publikigas en la revuo El mundo ilustrado, (6) serion da artikoloj tre objektivaj per kiuj li, analizante ĉiujn "por" kaj "kontraŭ", prezentas la IL-on al la ĝenerala publiko. En tiuj artikoloj, la aŭtoro proponas fondi Kuban Societon por la Propagando de Esperanto. La advokato Mariano Aramburo Machado daŭrigas la iniciaton de la antaŭaj kaj en 1907 publikigas du artikolojn en la revuo El figaro, (7) kie li rifuzas kun sufiĉaj elementoj kontraŭajn opiniojn pri Esperanto. Ambaŭ artikoloj aperas poste en ĉapitro de sia verko Literatura crítica, eldonita en Parizo en la jaro 1909. (8)

Post 1907, la agado de la tiam malmultaj esperantistoj pliintensiĝas kaj el tio rezultas la fondiĝo de kluboj en Santiago de Cuba, Camagüey, Sagua la Grande, Báez, Caibarien kaj Guantánamo.

Pro la efiko de la propagando, des pli bona ĉar subskribita de eminentaj intelektuloj -kiel la d-roj Ortiz, Aramburo, Juan M. Dihigo, Julio Jover, ktp.-, la 15an de oktobro 1908, en Santiago de Cuba, fondiĝas Kuba Esperanto Societo (KES), la unua en nia lando. (9)

Du monatojn post la fondiĝo de KES, D-ro Fernando Ortiz publikigas, en la ĵurnalo Diario español, la artikolon

"Societad esperantista", kie li informas pri tiu grava okazintaĵo. (10)

KES organizas kursojn kaj oni instruas la lingvon en du privataj lernejoj. Tiu organizaĵo intencas fariĝi la centra societo en la lando kaj tiucele nomumas "Komitatojn" (delegitoj) en tiuj urboj, kie jam ekzistas Esperanto-kluboj. Fondinto kaj unua prezidento de KES estas Sinjoro Pedro Pablo Valiente. La Societo ankaŭ eldonas nian unuan revuon: Kuba stelo, (11) kiu aperas nur dufoje (januaro kaj februaro 1909) ĉe la adreso Calvario A-10.

La Societo kaj la revuo, malgraŭ la giganta organiza laboro, malaperas pro kialoj ne difinitaj ĝis nun, en 1909.

Proksimajn numerojn, ni daŭre aperigos la unuan skizon historian de la E-movado en Kubo. Ĝis tiam, vi estas invitataj elverŝi opiniojn kaj iel, aliel kontribui (kial ne) al ĝia pliriĝo... Ĉu konas vi tiun de via teritorio?

Notoj

En tiu ĉi parto, krom Esperanton, ni uzas -metodologie- la internacian kodon por sciencaj skribaĵoj (en la Latina lingvo).

La notoj n-roj 2, 3, 7, 8, 9 kaj 11 aperas laŭ la indikoj de Alberto Fernández-Calienes, en "Notoj pri historio de la Esperanto-movado en Kubo (1904-1983)".

1. I. Sirjaev: "Kubo", en Enciklopedio de Esperanto, p. 307.
2. Jaro II, n-ro. 4, 1904, p. 41.
3. Jaro I, n-ro. 1, marto 1903, p. 6.
4. Letero kiun faris Ricardo Vicente la 27an de majo 1912 al Alemán Ruiz, laŭ sciigo sendita de Juárez Sedeño al la aŭtoro.
5. Idem.
6. Aracelys García Carranza: Bibliografia de Don Fernando Ortíz, p. 60.
7. Latinamerika esperantisto, jaro I, n-ro. 1, marto 1916 (sp.).
8. Pp. 241-246.
9. Latinamerika esperantisto, jaro I, n-ro. 1, marto 1916 (sp.).
10. La 16an de decembro 1908, p. 2, laŭ Aracelys García, Op. Cit., p. 132.
11. Katalogo de la biblioteko de G. D. Saratov, p. 49.

Bibliografio

-Fernández Calienes, Alberto: "Notoj pri historio de la Esperanto-movado en Kubo (1904-1983)". Havano, 1983, ne eldonita.

-García Carranza, Aracelys: Bibliografia de Don Fernando Ortíz.

-Kolekto de Latinamerika esperantisto.

-Persona arkivo de la aŭtoro.

-Persona arkivo de Pedro P. Lamas Díaz.

-Sciigoj senditaj de Raúl Juárez Sedeño al la aŭtoro.

pri movado senhalta

Camagüey: Prioritat-fonto

Kiel ĉiam, komence de la laborjaro kunsidas la komitatanoj de KEA por analizi la plenumitan laboron kaj la estonton. Januare, la urbo de la kruĉegoj, Camagüey, rolis la sidejon de la ĉi-jara renkontiĝo. Oni parolis pri la sukcesa festado de la 15-jara ekzisto de la Asocio kaj pluraj aliaj taskoj en la kampoj de instruado, informado, kulturo, organizo kaj ĉio koncerne al la ekzisto de KEA. Unu el niaj prioritatoj estas la financa vivo, kiu estante deficitita kapablis ŝargi sur si la diversajn taskojn meze de kriza periodo travivata de la lando. Pro tio ne estas mirinde ke tiu punkto montriĝis ege tikla, sed sukcesa. La buĝeto de la nuna jaro altrebas pli da realismo rilate al la nuntempa vivo, kiu postulas de ni racion kaj viglon por alfronti novajn defiojn sur tiu tereno. Alia prioritato por la nuna jaro estas sukcesigi la perkorespondan kurson lanĉitan tra la tuta lando kiel superan vojon disvastigi la lingvon en la nunaj insulaj cirkonstancoj. Libroservo estas alia prioritato kiun ne devas malatenti la estaranoj de KEA pro ties kultura kaj financa flankoj; tiucele oni bezonas serĉi plej taŭgan manieron ampleksi la librostokojn kaj laŭeble iniciati eldonon de novaj materialoj; tasko certe malfacila pro la alta kosto de tiu laboro enlande. La KEA-prezidanto Julián Hernández, prezentis kiel plian kaj ne malpli gravan prioritaton de la Asocio dum la nuna jaro, la preparlaborojn por la 2-a Nacia Kongreso de la kuba esperantistoj, evento kiu transformiĝos en kultur-klerigan feston kie la kubaj samideanoj renkontiĝos por pridiskuti tiklajn temojn de la esperanta laboro kaj ĝui kulturon, amikemon kaj etoson tre konatan kaj satatan de la esperantistoj kie ajn. Pro motivoj rilataj al la landa situacio la kongreso estos limigita je 100 kubanoj kaj laŭeble 20 eksterlandaj samideanoj. Tiucele ni devas diskonigi ĝin kaj sciigi al ĉiuj amikoj tra la mondo ke Havano estos la sidejo de la 2-a Nacia Kongreso de la 7-a ĝis la 9-a de marto 1996. Por plenumi tiujn ĉi prioritatojn, la estraro de KEA kaj ĉiuj samideanoj tra la lando laboras. La defio estas plezuraj kaj stimulina!

Maritza Gutiérrez

KEA jam kvar foje en EXPOLINGUA

Expolingua '95 (Fairo pri lingvoj kaj kulturoj), ĉi jare okazis de la 18-a ĝis la 23-a de aprilo en la Muzeo pri Belartoj. Partoprenis la eventon 250 delegitoj el 20 landoj, kaj nia Asocio muntis standon kaj aranĝis tre fruktodonajn kaj promesplenajn kontaktojn kun diversaj institucioj kaj artistoj.

En la scienca simpozio ni prezentis kvar prelegojn nome: Kontribuo de la kuba E-movado al la internacia kultura E-movado; Interlingvistiko kaj Esperanto; Denaska dulingvismo, kelkaj internaciaj praktikaj konsiloj kaj personaj spertoj; kaj Por la kulturo de Babel. Ilin aŭtoris, la asocia prezidanto Julián Hernández, kaj la estraranoj Maritza Gutiérrez, Héctor Jiménez kaj Martín Castro respektive.

Tiamaniere ni eksterigis la agadon kaj la sukcesojn de la esperantistoj nacie kaj internacie. Pluraj personoj montris intereson pri nia bona lingvo, dum aliaj profitis la okazon kaj aliĝis al la Perkorrespondanta Kurso (en la stando mem ni enskribis tiujn petintajn aliĝon). Expolingua do, restas por ni partopreninda evento se temas pri kulturo kaj informado.

Martín Castro

Pedagogio'95:

Digna reprezentigo

Atento al geinfanoj de bazaj lernejoj per Esperanto, kiel vojo por lingvistika orientigo, estas la titolo de la pedagogia sperto kiun prezentis nia samideanino Mayra Núñez Hernández, en la kadro de la tiom grava evento. La fakto ceesti ĝin reprezentas premion al serioza strebado de Agronoma Inĝenierino, kiu sen tro multaj pedagogiaj konoj sukcesis

enkonduki sian laboron post forbalai ĉiujn pintajn lokojn dum la municipaj, provincaj kaj alinivelaj konkuroj. Jam en la internacia evento ŝi montris al la naciaj kaj internaciaj pedagogoj, kiel Esperanto taŭgas por pli bona kono de la gepatra lingvo kaj kiamaniere ĝi propedeutikas por aliĝo de la kultura kaj intelekta niveloj de la infanoj.

IOM FOR DE LA ĈEFURBO... Jen, raporteto pri la lastaj kontrolvizitoj al filioj: Pri CHA, la rezulto estis bona. Ĉefa manko estas la neregula sendado de la protokoloj. Ili donas paŝojn por rapidigi la enspezon de kotizoj. Ĉio alia marŝas bonorde... En SCU la komunikado estas korekta, precipe fare de Gonzalo. Ĉio cetera iras stabile. Ĉion ĉi sciigis M. Gutiérrez... MAT viglas lastatempe en P. Be-tancourt grupo de entuziasmaj homoj... En LHA, ĉio ja korektas. Kontaktoj regulaj kun Mayra (Quivicán), certigas la agadon tie. Rilate al Santa Cruz, perdiĝis komuniĝo... El CAV Juan Ramón sciigas iom

malagrablajn novaĵojn; Ĉefe ĉar la entuziasmo manko, pro diversaj kialoj, regas la situacion tie. Dum tio daŭrigu, la baptopatroj (JR k. Alexis) atentos ilin perletere, kion ili ja ŝatas... Kiel kutime, en SSP, ĉio stabilas... Pri VCL, oni faris ekspozicion en la provinca ĉefurbo, danke al la agema J. L. Montes de Oca, kiu vojaĝas pli ol 20 kilometrojn, el Santo Domingo, por demonstri al la homoj de Sta Clara kion oni devas fari, se pri esperantismo temas... Nia prezidanto, post sia vizito al HOL, raportas ian stabilon kaj okazontan orientprovincan arangan, omage al la XVIA datreveno de la Asocio...

En la plej okcidenta provinco de Kubo, Pinar del Río, la loka E-Filio okazigis allogan renkontiĝon, kiun partoprenis esperantistoj el Havano, Urbo Havano, Quivicán, Sancti Spiritus, Santiago de Kubo, Guantánamo kaj Pinar del Río.

Dum tri tagoj (17-18-19a de marto) la infana centro de esploristoj "Gilberto Picos Rivert", estis alloga esperantujo por dudeko da esperantistoj, kiuj nestis en kontakto kun la naturo kaj ionete lernis pri metodoj de tranoktado, kiurado kaj aliaj teknikaĵoj por esploraj laboroj.

La programo enhavis luterikon, ludojn, informsekcion pri la enlanda movado kaj interŝanĝon de instrumentadoj. Gratulojn por la prezidanto de la Filio, S-ro. Alberto Martínez, kaj ceteraj organizantoj de la evento.

Norberto Díaz Guevara
(el Jajabo, Sancti Spiritus)

Antaŭen!

La 16an datrevenon de Kuba Esperanto-Asocio oni festos tra la lando. Ĉefa aranĝo okazos en tiu ĉi ĉefurbo ĝuste la 16an. Oni planas festi modeste sed kun la kutimaj gajeco kaj kreivemo de sia anaro. En la provinca Filio Holguín ankaŭ estas aranĝota renkontiĝo liucola, (16-18a de junio). La tiuj esperantistoj invitis membron de la Nacia Estraro, kiu post reveno raportos pri ĝi. Venontnumere Avanco prikomentos la detalojn.

Kiel jam tradicie oni okazigos trejniĝan seminariojn por instruistoj. La eventon oni disvolviĝos en la nacia sidejo inter la 21a kaj la 23a de junio. Ĉi jare ĝi havos aparte specialan ĉarmon, ĉar ĝi okazos ankaŭ omage al la nova datreveno asocia kaj pro tio ke la partoprenintoj devos aranĝi similan renkontiĝon en ties koncernaj teritorioj. Pri la rezultoj de la evento, venontan numeron Avanco dediĉos sufiĉan spacon.

NIAJ DU DELEGITOJ AL TAMPERO

Post analizo flanke de la Nacia Estraro, oni proponis kaj unuanime konsentis ke, krom la prezidanto, Maritza Gutiérrez partoprenu la UK-on. Ĉefaj kialoj estis, la stabila laboro, la rezultoj atingitaj kaj, ĝenerale pro la integra laboro en la Asocio, pasintan kaj nunan jarojn. Oni analizis, krome, la eblon ke alia persono, el provinco, havu la ŝancon, sed fine evidentigis

ke en niaj filioj bezonatas plia konstanteco kaj konstantindaj laborrezultoj. Kiel tradicie, la financa situacio staras kiel limigo, tial do, eblas nur garantii la sekuton de dumembra delegacio. La 80a UK de Esperanto (22-29 de julio 1995), pritraktos la temon "Ni, la popoloj, unu mondo aŭ disaj eroj", lige al la 50-jara jubileo de UN. Okaze de la jubileo, oni planas organizi modelan UN-Asembleon.

DUA BULTEND
DUA NACIA KONGRESO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO
PROVIZORA PROGRAMO

De la 7a ĝis la 9a de marto 1996 okazos en Havano la Dua tutlanda kongreso de Esperanto organizita de KEA. Kun la sperto de teamo jam organizinta Universalan Kongreson, sed sen tre ambiciaj pretendoj, la Organiza Preparkomitato de la Kongreso preparis programon (provizoran), kiu kontentigos kiel eble plej multajn bezonojn de la insulaj esperantistoj kaj ankaŭ de fremdaj vizitantoj. Ni invitas ĉiujn ĝi neforgeseblan renkontiĝon kie homa varmo kaj amikema rolo la ĉefajn akompanantojn dum tri printempaj tagoj en Kubo.

7an de marto

09:00-09:30 Bonvena koktelo

09:30-10:30 Inaŭguro

PAUZO

11:00-12:00 Prelego pri Historio de E-o en Kubo

HALO ZAMENHOF

HALO F. ORTIZ

12:10-13:00 Ronda tablo ILEI

Prelego 1

TAGMANĜO

14:30-15:30 Prelego 2

Prelego 3

15:40-16:30 Modela leciono pri akuzativo

Aŭkcio-Deklama konkurso

20:00 Distra Kulturprogramo

8an de marto

HALO ZAMENHOF

HALO F. ORTIZ

09:30-10:20 Prelego 4

Prelego 5

10:30-11:30 Kunsido E-o en Latinameriko

Prelego 6

PAUZO

12:00-12:50 Forumo Esperanto-kulturo en Kubo

TAGMANĜO

14:00-14:50 Prelego 7

Prelego 8

15:00-16:00 Prelego 9

Prelego 10

16:10-17:00 Vizito al Zamenhof-memortabulo

20:30

Nacia Kulturvespero

9an de marto

HALO ZAMENHOF

HALO F. ORTIZ

09:30-10:20 Prelego 11

Prelego 12

10:30-11:20 Ronda tablo

Ronda tablo

Tradukado

Informado

PAUZO

12:00-13:00 Ronda tablo

Orienta Speciala

Laboro kun Infanoj

Diina Masaĝo

MANĜETO Komitato-Elekto

14:00-14:30 Prezento de la nova estraro

14:30-14:50 Premio Belarta Konkurso KEA

15:00-16:00 Fermo

21:00 Esperanto-Kabareto

Interesitoj prelegi kadre de la Kongreso devas jam anonci sin al la kongresa PKK. Antaŭ aŭ postkongresajn programojn eblas organizi laŭ mendoj de kongresantoj, ĝis la 9E.01.31

Venu al Havano kongrese!

Ciferecigis: Javier Ramos
 @Radioamatoro